## Pri primoj

"Primo" estas pozitiva entjero, kiu ne estas produto de pozitivaj entjeroj krom 1 kaj si mem (PIV 2002). Mallonge: Primo estas nombro dividebla nur per 1 kaj si mem. Por instige aktivigi eventualan asocian fakgrupon matematikistan kadre de ISAE, jen du kuriozaj ludadoj prim-nombraj.

Matematikistoj havas iuspecan preferon por primoj kaj kun tiuj eblas ludoj. Jam en la 17-a jarcento ili dokumentis, ke ĉiuj nombroj de la sekva vico estas primaj:

| |
|---|
| 3 |
| 31 |
| 331 |
| 3331 |
| 33331 |
| 333331 |
| 3333331 |
| 33333331 |

Kelkaj matematikistoj eĉ asertis, ke ĉiuj pluaj nombroj de tiu ĉi vico estas primaj. Sed montriĝis, kiel nekalkuleblaj estas tiuspecaj nombrovicoj, ĉar jam la sekva 333 333 331 ne estas primo sed la produto de 17 x 19607843. Nur ĉe 18 tri-oj venas en tiu ĉi nombrovico la sekva primo.

La miriga afero ĉe la nombro 73 939 133 estas, ke tiu ĉi cifera sekvo ĉiam denove produktas primon, se oni fortranĉas la dekstraflankan ciferon:

| |
|---|
| 73939133 |
| 7393913 |
| 739391 |
| 73939 |
| 7393 |
| 739 |
| 73 |
| 7 |

Pli mirige eĉ estas, ke ĝis hodiaŭ ne estas konata pli granda nombro, ĉe kiu same funkcias tiu ĉi ludado. Ĉu provoko por esperantlingvaj matematikistoj? (2009-09-9/17) *-sa*


# Scienca Revuo Vol. 61 (2010) (2) / n-ro 221

**Oficiala organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)**

**Hejmpaĝo: http://www.eventoj.hu/isae/**

Pres-indikaĵoj: ISSN 0048-9557.
Eldonanto: ISAE Eldonkvanto: 200 ekzempleroj
Laserkopiita: Aprilo/majo/junio 2010 ĉe *Copy & Co, Marktplatz 30 DE - 37269 Eschwege*/Germanio
Redakcia komisiono: La estraro de ISAE kaj la du honoraj membroj

Membrokotizo de ISAE : € 20,00/jare
pagebla pere de via
a) landa peranto (resp. landa delegito)
aŭ rekte al
b) ISAE-konto ĉe UEA/*Rotterdam* (NL): isae-z *) *vd. sube*
aŭ per
c) IBAN: DE51 3701 0050 0318 2915 09, BIC: PBNKDEFF
t. e. por ISAE-anoj el Germanujo: vi pagu (anstataŭ kiel pli frue al ISAE/Sachs) al la germana poŝtĉeka konto de UEA n-ro 3182 91 509, BLZ 370 100 50 en *Köln*, Germanio, kun indiko "ISAE-jarkotizo (...jaro...) por UEA-konto isae-z" *) *vd. sube*

**Landaj Perantoj de ISAE**

| | | |
|---|---|---|
| Aŭstralio | *Libroservo AEA* | *<libroservo@esperanto.org.au>* |
| | *143, Lawson St., Redfern, AU 2016 N.S.W.* | |
| Brazilo | *Brazila Esperanto-Ligo (BEL)* | *<bel@esperanto.org.br>* |
| | *C.P. 03625 BEL, BR 70084-970 Brasília* | |
| Britio | *S-ino Viv O'Dunne* | *<eab@esperanto-gb.org>* |
| | *p.a. Esperanto Asocio de Britio (EAB)* | |
| | *Station Rd., Barlaston* | |
| | *Stoke-on-Trent, Staffordshire, ST12 9DE Britio* | |
| Finnlando | *S-ino Päivi Saarinen* | *<paivi.saarinen@iki.fi>* |
| | *Ruorimielenkatu 5 C 23, FI-02320 Espoo* | |
| Francio | *S-ro J.Charles Trébouet* | *<trebouet.bohere@club-internet.fr>* |
| | *Ferme de Monchy, FR-60390 Auneuil* | |
| Irlando | *S-ino Joy Davies* | *<noviresp@eircom.net>* |
| | *9, Templeogue Wood, IE-Dublin 6W* | |
| Korea Resp. | *S-ro Cho Sung Ho* | *<shcho@inha.ac.kr>* |
| | *Biol.Fak.Inha Univ., KR Inchon 402-751* | |
| Norvegio | *Eldonejo Esperanto* | *<hara-ryg@online.no>* |
| | *Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo* | |
| Pollando | *S-ino Magdalena Tatara* | *<mtatara@gmail.com>* |
| | *Košmice Wilkie 323, PL32-020 Wieliczka* | |
| Svedio | *S-ino Lisbeth Andréasson* | *<bertil.andreasson@horby.mail.telia.com>* |
| | *Kajsa Kavats gata 8, SE - 24235 Hörby* | |
| Usono | *Esperanto-USA* | *<eusa@esperanto-usa.org>* |
| | *1335 Stanford Ave, Suite 300, Emeryville CA 94608, USA* | |

***) Nepre informu pri via membrokotizpago laŭ b) (kun indiko de la kompleta poŝtadreso kien estu sendata Scienca Revuo) la eldonanton:**
**Prof. Dr. R. Sachs, Vor dem Brückentor 3, DE-37269-Eschwege/Germanio**
**Tel. xx49-(0)5651-331866; <ISAESachs@aol.com>**